



# BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO

AÑO XVIII - Nº 237

ENERO-FEBRERO 1980

## MADRID, KONGRESURBO POR 1980



FONTANO NEPTUNO

**BOLETIN  
DE LA  
FEDERACION ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO**

**DIRECTORA:**

D<sup>o</sup> M<sup>o</sup> Aurora Vilorio Nieto

**DIRECCION  
Y ADMINISTRACION:**

Dos de Mayo, 4  
VALLADOLID

**REDACTOR JEFE:**

D. Salvador Aragay Galbany  
Bassegoda, 40 - Telf. (93) 2401428  
BARCELONA-28

**COMITE DE REDACCION:**

D. Llibert Puig  
D. Giordano Moyá  
D. V. Hernández Llusera  
D. Gabriel Mora y Arana  
D. Pedro Nuez

**UTILAJ  
ADRESOJ**

HISPANA ESPERANTO FEDERACIO  
Dos de Mayo, 4  
VALLADOLID

**Prezidantino**

M<sup>o</sup> Rafaela Urueña Alvarez  
Avda. Ramón y Cajal, 12-2<sup>o</sup>-C  
Télf. (983) 260086  
VALLADOLID

**Sekretario**

Luis Hernández García  
adreso kiel supre

**Kasistino**

Carmen Conde Labajo  
Calixto Valverde 8-8<sup>o</sup>-A  
VALLADOLID

Pagoj sendu al nia Konto  
N<sup>o</sup> 001.664-0  
Caja de Ahorros Popular  
Ag. Urbana E.  
A. Lorenzo Hurtado, 1  
VALLADOLID

LIBRO-SERVO DE H.E.F.  
Jacinto Urueña Antón  
Dos de Mayo, 4  
VALLADOLID

Pagoj por Libro-servo, sendu al  
Caja de Ahorros Popular  
Oficina Central  
Cuenta N<sup>o</sup> 042.268-4 a nombre de  
LIBRO-SERVO DE H.E.F.  
VALLADOLID

**ELDONA FAKO**

Inés Gastón  
P<sup>o</sup> de la Constitución, 35-4<sup>o</sup>  
ZARAGOZA-1

**INFORMA FAKO**

Ramón Molera  
Sta. Joaquina, 13  
MOYA (Barcelona)

**ĈEFDELEGITO DE UEA**

Juan Azcuénaga Vierna  
Capitán Palacios, 3-4<sup>o</sup>-N  
SANTANDER

*La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinion de H.E.F., escepte en okazo de oficiala komuniko; ĝi ankaŭ ne reprezentas la opinion de la Redaktoro; do, pri la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.*

# SALUTO KAJ INVITO

Denove mi salutas la hispanajn esperantistojn por inviti ilin partopreni la 40-an Hispanan Esperanto-Kongreson.

Madrid jam estis sidejo de Naciaj Esperanto-Kongresoj en j. 1957-a kaj en j. 1973-a sed eble la ĉefa esperantista evento en la hispana ĉefurbo estis la 53-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu restas ne nur en la memoro de multaj hispanaj esperantistoj kiuj partoprenis; sed, ankaŭ multaj eksterlandaj esperantistoj memoras ĝin. Ne vane, Madrid estas la geografia centro de la duoninsulo kaj turisma fokuso por la eksterlando.

Madrid proponas al ni, tiel diversajn aspektojn ke ĝi, kiel ĉefurbo de nia Lando fariĝas pli altira kaj vizitinda. Ĝi estas ne nur la granda metropolo kun belegaj ĝardenoj, larĝaj avenuoj kaj grandaj magazenoj, sed ankaŭ la tipa angulo de la Austria Madrido, de la Borbona Madrido, de la Romantika Madrido, la tiama Madrido tiel bone priskribita en la romanoj de Galdós, aŭ la Madrido de Goya kaj de la Muzeo «Prado». Vere mi povas diri ke Madrid proponas al ĉiu vizitanto, tion kion li serĉas, ĉar, ankaŭ la nokto en Madrid havas interesajn allogaĵojn.

Kion, do, povos trovi krom tio, la esperantistoj kiuj deziras partopreni la venontan Nacian Kongreson?

Mi opinias ke ĉi tiu Kongreso estas por ni tre interesa, ne nur pro la alloga programo, enhavanta laborajn kunvenojn, kulturajn aranĝojn kaj vizitojn al interesaj ĉirkaŭaĵoj, sed speciale, ĉar ĝi prezentas al ni la grandan defion kiun la Madrida esperantista junularo direktas al ni.

La Loka Kongresa Komitato estas junula, kaj pro tio, ĝia laboro, ĝia entuziasmo donas al ni la eblecon de vera eltrovo de la esperantista junularo, fakto kiun ni tiom deziras kaj bezonas.

Ili entuziasme laboras por ke la Kongreso sukcesu kaj ni devas doni al ili la taŭgan respondon. Se ĉiam oni devas profiti la Naciajn Kongresojn por la necesa kontakto inter la Estraro de la Federacio kaj ĉiu samideano, nun estas la plej taŭga momento por kontakti kun la junularo.

Ĉi tiu Kongreso ne estos por ke ni aŭskultu la junularon, sed ĝi estos aranĝita de junula L.K.K. al kiu ni devas respondi per amasa alesto al la Kongreso en Madrid.

Tial, karaj gesamideanoj, mi invitas vin aliĝi frue al la Kongreso, kiu okazos sub la Alta Protekto de S.E.M. la Reĝino de Hispanujo, D-a Sofia.

**D-rino Maria Rafaela Urueña**  
(Prezidantino de H.E.F.)

# La Katalunaj Floraj Ludoj 1978

Belaspekta volumeto, enhavanta la verkojn premiitajn en la XVIII-aj Internaciaj Floraj Ludoj, okazintaj en Tortosa (Hispanio) en Septembro de 1978, sub organizado de K.K.K. de HEF. Verketo eldonita de la eldona fako de HEF. 75 paĝoj. Prezo, 200 p-toj. Mendu ĝin ĉe Libroservo de H.E.F.

Speciale kortuŝa estas la festparolado de la prezidanto de la Juĝa Komisiono, Pastro Manuel Casanoves, kiu rememoras la longan tradicion de la Floraj Ludoj ekde la jaro 1909, okaze de la Kvina Universala Kongreso en Barcelono, ĝis 1936, kiam eksplodis la fratmilito en nia lando. Post longa silento, la Floraj Ludoj renaskiĝas en 1978 kun la verkoj ĉi tie komentitaj.

Mi rimarkigas, por komenci, la entuziasmon, memfidon kaj senliman sindonemon de la katalunaj esperantistoj, denove prenantaj sur siajn ŝultrojn la noblan taskon organizi la Florajn Ludojn, kiuj espereble povos altigi la nivelon de nia literaturo kaj stimuli la kreokapablon de multaj poetoj kaj prozistoj en la internacia lingvo.

Tion dirinte, mi komentu —mallonge, bedaŭrinde— la premiitajn verkojn.

Kris Long, per sia poemo «El Taglibro por Kristina», atingis la Naturan Floron, plej altan premion en la Konkurso, pri la poemo «Ampoezio». La poemo estas areto la diversaj sendependaj strofoj tre variaj

pri enhavo kaj metriko, kun versoj senrimaj. Sur intelekta fono, nur okaze aperas la lirika rilato «mi/vi», kaj tiel ambaŭ flosas en diskreta mezlumo, en mistera atmosfero: «ensvarma aero», «arbaroj ĉinaj», «kolosaj nuboj-trempitaj dum la nokto en grizo», «foro kara», «matena roso»; la suno estas «ruĝa bovlo sub nubaro». Ne aperas indicoj lokotempaj, kaj la poezio fontas kaj ŝajne plaĉe restas en la internaj kampoj de la lirika «mi», enigme, sen eksteraj apogiloj. Kris Long konscie ignoras la normojn de la establita poezio kaj marŝas laŭ novaj eksploraj vojoj. Oni povas demandi: «Kien?», sed oni devas agnoski originalecon kaj fundan poezian spiriton al lia poemo, kiu aŭdace flugas al novaj kaj freŝaeraj regionoj de la esperanta poezio.

Subpremion ricevis Reto Rossetti, per «Tenera Saŭdado». Marŝante sur la klasikaj reloj de la ama poezio, la verko de Rossetti estas vere ĉarma poemo. Tri strofoj el diversaj mezuroj laŭdas la belecon de la amatino per dolĉaj vortoj kaj nekutimaj, originalaj komparoj, kaj samtempe ploras la solecon de la amanto. Jen amo kaj soleco, du eternaj temoj en la poezio.

«Marborde», de Zora Heide, gajnis duan subpremion. Precizaj koordinatoj (plaĝo-somero) situas la poemon en loko kaj tempo.

Versoj liberaj, mallongaj kaj vibraj.

Emociigas la sincereco, la sentemo, eĉ la ŝajne naiva neperfekto de la versa strukturo kaj la spontanea esprimivo de la sentoj.

La premion «Jasmeno» (al priesperanta poemo), gajnis Simeon M. Simeonov, per sia «Stranga Songô». Li verkis solidan poemon, alegorian rakonton, baze dekdusilaban, sur la samaj rim-kaj mezurprincipoj de «La Vojo», eĉ kun identaj vortaro kaj sintakso, kaj kiel poeta respondo al la sama situacio kaj cirkonstancoj. La poemo, verkita sendube antaŭ pli ol kvindek jaroj, povas fariĝi komparilo por la nuntempa poezio. Simeonov honeste kaj emfaze kantas belan idealon: fratecon tutmondan kaj la internan ideon.

Lina Gabrielli per sia poemo «Rita» gajnis la premion «Violo», sub la temo «Humanisma poemo».

Per ne rimantaj, heterometraj versoj, Gabrielli rakontas travivitan epizodon, renkonton kun iu mistereca Rita, malfeliĉulino malsata kaj senhejma. Kie kuŝas la ĉarmo — la evidenta ĉarmo — de tiaj versoj? Ne en la perfekteco de la ekstera formo, sed ĉefe en la tono humila, intimeca, vere homama, kiu elbordiĝas de la komponado, kaj en la nobla sinteno de la fikcia aŭ reala «mi» antaŭ la dilemo feliĉo/egoismo.

Subpremion ricevis J. Balbin, pere de sia «Ĉi nokte». Mankas interna ritmo, sola rimedo povanta anstataŭi rimon kaj mezuron. Kaj tamen, vibras en la poemo iu nedifinebla angoro, kiu premas la animon de la leganto. Ĉiu vorto, ĉiu esprimo, posedas specifan pezon. Neabundas adjetivoj, kaj tial la nudaj substantivoj, la verba prezenco, la ripetado de la «leit motiv» («la silento de mia ĉambro») efikas por transcendi al la leganto la intensan teruron, kiu regas la animon de la poeto.

Bernard Golden (kiu antaŭ nelonge aperigis tre akutan studon pri la esperanto-grupo en la paĝoj de «Heroldo»), gajnis la premion pri Originala Prozo.

Ĉiuj konas la malfacilon de tia genro, kie majstris la plumo de Raymond Schwartz. Ni memoru kiel ekzemplon «La puto de Poupeleche», kie la kulmina punkto de la rakonteto eksplodas en la lasta alineo.

Per simila tekniko elvolviĝas «Memoraĵoj el Pompejo», de Golden. Lia lingva majstreco glatigas nian vojon ĝis la fino, kaj ĝuste tie troviĝas la sprita kaj filozofa moralo de la rakonto.

Subpremion gajnis la eseo «Onia meditado», de Giordano Moya, kiu uzas plej puran kaj klasikan esperanton. Lia eseo plenplenas je transcendaĵoj filozofaj demandoj: La Universo kaj la memo, la enigmoj de la kreado kaj la vivo, la homa intuicio pri tempo kaj spaco, esto kaj nenio, paseo kaj futuro, vivo kaj morto...

Sendube multaj el la sindemandoj de Moya estas jam responditaj de Aristotelo, Descartes, Kant, Einstein kaj aliaj pensuloj. Sed tamen, por la homo Moya, kiel okazis por la homo Unamuno kaj okazas al multaj el ni, la plej gravaj el tiaj demandoj restas ankoraŭ senrespondaj, kaj lia menso luktas kontraŭ la silento de la nekonata.

Duan Subpremion iris al Oldrich Knichal, aŭtoro de «Luna nokto». Postmilita rakonteto, iomete konfuza kaj tamen kortuŝanta. Simpla lingva nivelo, rekta, vigla kaj plenesprima.

Jen, do, skizo de la premiitaj verkoj. Bedaŭrinde, ne eblas funde analizi ilin, pro manko de spaco. Ĝoje ni devas saluti la renaskiĝon de la Katalunaj Floraj Ludoj, ĉar ili sendube grave kontribuos al la revigliĝo de la literatura kreado en nia lando, kaj, ni esperu, al la malapero de la tiel nomataj «poeziaĵoj» makulantaj la paĝojn de nia revuaro. Necesas ke ĉi tiuj verkoj aperu inter ni, ke ili estu legataj kaj komentataj en niaj Kluboj, kiel stimulo al enpotencaj verkistoj kaj samtempe kiel timigiloj por fuŝpoetoj. Sed, tute speciale, por la plezuro de tiuj, kiuj amas belletron.

JES



**Gepartoprenintoj en la 39-a H.E.K. antaŭ la enirejo de la Grotoj «Tito Bustillo» (Foto Sala Campamá).**

## POST LA KONGRESO

Reveninte hejmen mi revidas mense la kongresajn etapojn; mi pensas pri la celo, pri la rezulto; mi demandas, ĉu ni faris ĉion, kion ni povis; ĉu ni agis ĝuste, ĉu ion ni preteratentis, ĉu ion ni fuŝis.

Kio estas Kongreso de Esperanto? Grava diferenco estas inter la niaj kaj tiuj de aliaj fakoj. Kongresoj en nacia lingvo celas ian solvon per debatoj, eksterlingvan. La lingvo tie ne estas konsiderinda, kaj se la debatado ne rezultigas klaran konsenton kaj decidon —rezolucioj ofte ne havas efikon— la kongreso estis senrezulta.

Niaj kongresoj celas la lingvon mem; niaj problemoj, niaj decidoj, niaj intencoj koncernas ĉiam la lingvon. Tial, la ĉiujara kolektiĝo en difinita landopunkto, estas tre konsiderinda, eĉ sen gravaj debatoj, eĉ sen reliefaj decidoj, eĉ sen videblaj rezultoj.

Sen kolektiĝoj, nia afero estus nur teoriaĵo. La vivanteco de Esperanto rezultas el la viva uzado, el la vigla kaj normala interparolado. Kiam en la jaro 1905a okazis la Unua Universala Kongreso, tiam Esperanto ekvivis praktike kaj pruvis ke la solvo de interpopola lingvo estas jam trovita. Tial niaj kongresoj, ĉu naciaj, ĉu internaciaj, konsistigas la kernon de nia Movado. Ili ebligas —unu fojon en la jaro!!— la renkontiĝon de unuopaj samideanoj disde loĝantaj, kiuj tiel povas ekzercadi la lingvon; ili stimulas la revon de novaj adeptoj, kiuj konstatas faktan funkciadon de la lingvo; ili plu vivigas la esperon de malnovaj kaj eble maljunaj samideanoj; ili evidentigas la gramatikajn erarojn, kiujn oni pro diseco faras; ili estas fine, lernejo, stimulo, varbejo kaj brila fokuso en la gastiganta urbo, kie iamaj skeptikuloj mire konstatas ke Esperanto ankoraŭ vigle funkcias, kie iamaj simpatiantoj vidas ke la interpopola lingvo plu vivas prospere, kie novaj homoj ekscias ke kontraŭ la lingvomultecko ekzistas Esperanto, absolute neŭtrala, same kiel kontraŭ la distanco ekzistas la telefono; sed la telefonon oni facile uzas, kaj neniam mi trovis tian homon, kiu pli preferas pasi trans dekoj da stratoj por venigi kuraciston ol ekuzi telefonilon. Dume la interpopola lingvo stagnas kvazaŭ ĝi estus telefonilo malŝatata.

Oni ne serĉu en tio «misteron» au «nigran manon», kiu perfide malhelpas. La kaŭzo estas la egoismo. La scion de la neŭtrala lingvo oni ne povas aĉeti. Ĝi postulas sindonadon, fervoron, ŝatadon. Monereto ebligas telefoni, sed monerego ne kapabligas paroli. Tial niaj kongresoj estas kaj plu devas esti fokuso, kvazaŭ plurtagaj esperantistejoj, kie la lingvo manifestiĝu en sia plena povo, en sia natureco, en sia beleco.

Antaŭ evidentaj faktoj eĉ la plej ŝtona kapo kliniĝas. Ni ekspluatu do ĝisekstreme la kongresajn kunrestadojn por vivigi la lingvon, por planadi propagandon, por perfektigi la landan organizaĵon kaj veni kiel eble plej rapide al plena posedo de la Lingvo Esperanto.

**Salvador Gumá**

# NOVJARA MESAĜO DE LA PREZIDANTO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Dum la jardeko, kiu nun malfermiĝas antaŭ ni, la Internacia Lingvo Esperanto fariĝos centjara. Tra la jaroj depost 1887, la lingvo alportis ĝojon kaj feliĉon al milionoj da homoj. Ĝi malfermis la horizontojn al simplaj civitanoj, ĝi dissemis sentojn de internaciismo kaj komprenemo en mondo malpaca, ĝi kreis kulturajn pontojn inter la nacioj, kaj ĝi ebligis praktikan komunikadon inter la homoj en spirito de egaleco.

Ĝia influo etendiĝis preter la uzantojn mem. Scioj akiritaj per Esperanto penetras en la sociojn, kaj la principoj de esperantismo efikis ankaŭ ĉe tiuj, kiuj ne konas la lingvon mem. Kvankam la rivaleco inter la grandaj naciaj lingvoj ankoraŭ regas en multaj internaciaj rilatoj, Esperanto abunde montris, ke ĝi kapablas plene ludi la rolon de efika internacia lingva komunikilo.

Restas tamen la demando, ĉu tiu lingvo plene elprovita farigos akceptita de la grandaj internaciaj organizaĵoj, la diverslandaj edukaj sistemoj, kaj la ĉiam kreskanta nombro da homoj, kiuj partoprenas la internacian komunikadon. Restas la demando, ĉu oni utiligos ĝin kiel lingvon de la nova komunika teknologio. Aŭ ĉu oni preferas solvi la internacian lingvan problemon per diskriminaciaj solvoj, favorante certajn naciojn kaj lingvojn, kaj malfavorante aliajn?

La respondo al tiu demando restas parte en la fluo de la historio; sed parte ĝi restas en la manoj de la parolantoj de Esperanto. La mondo ne venos al Esperanto kvazaŭ nature. Se tiel estus, ĝi venus al paco kvazaŭ nature, ĝi venus al malarmado kvazaŭ nature, kaj ĝi estingus homan kruelecon kaj homan mizeron kvazaŭ nature. Male, ĝi venos al Esperanto ĉar la parolantoj de tiu lingvo konscie kaj harmonie kaj sagace laboros por tiu celo, forigante la senscion kaj farante el skeptikuloj konvinkitojn. Oni ofte aŭdas, ke ekzistas antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto, sed vere la ĉefa malhelpo estas senscio, kaj prudentaj duboj forigeblaj per pravaj argumentoj.

Ĉu, do, la jardeko de la 1980aj jaroj estos la jardeko de Esperanto, la jardeko, en kiu oni fine konsciiĝos pri la maljusteco kaj la nenecesaj kostoj de la nuna internacia lingva reĝimo? Lingvoj ne kreskas kiel arbaraj fungoj: ili bezonas jardekojn, eĉ cent jarojn, por maturiĝi. La Internacia Lingvo jam kreskis kaj maturiĝis: ĝi staras nun preta por tiuj, kiuj pretas utiligi ĝin.

En decembro 1979 kompletiĝas 25 jaroj da rekono de Esperanto flanke de Unesko: la fama rezolucio subtena al Esperanto estis akceptita de la Ĝenerala Konferenco en 1954. Tiu datreveno koincidas kun nova erao en la rilatoj kun Unesko kaj UN, inaŭgurita de la vizito de la Ĝenerala Direktoro de Unesko al nia kongreso en 1977 kaj nun de la malfermiĝo en Novjorko de nova oficejo de UEA kies specifa celo estas fortigi la rilatojn kun UN. En la jaro nun finiĝanta la sekretario de Ekosok vizitis nian kongreson, kaj UEA estis elektita al gvida rolo en la konstanta komitato de nereĝistaraj organizaĵoj ĉe Unesko.

UEA mem estas pli forta, pli harmonia kaj pli finance kaj morale stabila ol ĝi eble iam ajn estis. Niaj membroj estas lojalaj kaj sindonaj. Kaj novaj moviĝoj de intereso pri Esperanto animas kontinentojn antaŭe apenaŭ tuŝitajn de la Internacia Lingvo.

Staras preta la lingvo. Malfermiĝas al ni iom post iom la internaciaj organizaĵoj, la publika opinio. Pretas nia Asocio. Je tiu ĉi favora epoko, je la sojlo de nova jardeko, ni redediĉu nin al la laboro por la Internacia Lingvo per novaj fortoj. La jaro 1980, kaj la tuta jardeko, kiun ĝi inaŭguras, alportu pli pacan, justan kaj harmonian mondon, kie la spirito de egaleco kaj kompreniĝo animas ankaŭ la lingvan kampon per la Internacia Lingvo Esperanto.

Humphrey Tonkin  
Zamenhof-Tago 1979



Galicia pejzaĝo. Rodo de Rande en la riverenfluejo de Vigo.

## Bernard Golden

En *Revista Portuguesa de Esperanto*/1979, junio, p. 49/ aperas jena frazo.

«Ekde la XII jarcento, la beletraj verkoj en galicia-portugala lingvo estas elmontritaj, en kampofestoj, foiroj kaj nobeldomoj...». Kiu havas scion pri la lingvoj de la Ibera duoninsulo, ne dubas pri la signifo de «galicia»; ĝi estas, tutnature, la lingvo de la loĝantoj de Galicio. Sed kiu parolas ĝin galicoj aŭ galicianoj?

En alia verko en Esperanto mi legis tiun ĉi frazon.

«Al mia lerta amiko profesoro N.L.—L. en la universitato de Oviedo mi ŝuldas mian scion pri nordiberaj, baskaj (tiele), asturaj kaj galicaj grotoj...» /Leander Tell, *La Bela Subtera Mondo*, 1959, p. 46/.

Denove, estas certe, ke temas pri grotoj en Hispanio.

Esperantistoj, kiuj konas la orientan Europon, vidante ekster kunteksto la du adjektivajn formojn, «galicia» kaj «galica», gratos al si la kapon kaj demandos, kiu adjektivo priskribas la regionon en la nordokcidenta parto de Hispanio apud Portugalio, **Galicia**, kaj kiu adjektivo rilatas al la alia **Galicia**, kiu estis historia regiono de la nordaj Karpatoj, antaŭe aŭstria reĝlando, poste pola teritorio inter la du mondmilitoj, kaj nuntempe dividita inter Pollando kaj Ukrainio.

La konfuzo troviĝas ne nur en Esperanto; ankaŭ en kelkaj etnolingvoj ambaŭ regionoj havas identan aŭ tre similan formon. Jen ekzemploj.

<u>Lingvo</u>	<u>Hispanio</u>	<u>Karpatoj</u>
1. angla	Galicia	Galicia
2. hungara	Galicia	Galícia
3. hispana	Galicia	Galizia
4. germana	Galicien	Galizien
5. franca	Galice	Galicie
6. portugala	Galiza	Galícia
7. rusa	Galisija	Galicija
8. latina	Gallaecia/Callaecia	Galicia



# LINGVO KAJ GALICAJ GROTOJ

---

Malgraŭ kelkaj malgravaj ortografiaj diferencoj, la prononco de ambaŭ nomoj en lingvoj 1 - 4 estas identa. En 5 kaj 6 la diferenco konsistas el la litero «i», kaj en 7 el literoj «s» kaj «c». La latina formo **Galicia** estas malfrua, formita verŝajne surbaze de slava radiko: **gal** aŭ **galiĉ**.

Jam en la 19-a jc. la loknomo Galicujo estis uzata en **La Esperantisto** por la pola teritorio. Kelkaj Esperanto vortaroj registras la saman loknomon kiel «Galicio». Antaŭ la apero de **Plena Ilustrita Vortaro** en 1970, la hispana regiono havis la formon «Galico», sed ĝi ne troviĝas en vortaroj same ofte kiel Galicio. Tiuj vortaroj, kiuj pluformas la radikojn por ricevi la nomon de la loĝantoj, faras tion laŭregule, aldonante la sufikson «-an»: galicano, galiciano. Inter tiuj vortaroj, la Esperanta-hispana de Paluzie-Borrell enhavas ankaŭ la vorton «galego», la loĝanto de Galico.

La paronima paro Galico/Galicio havas du malavantaĝojn. Unue, la diferencigo estas farita per nur unu litero, «i», do oni devas memori, en kiu nomo ĝi troviĝas; cetere, oni devas elparoli kaj aŭdi ambaŭ vortojn tre klare, por ke ne okazu miskompreno. Due, Galico, kompare kun la plimulto de la etnolingvaj nomoj de tiu regiono, ne havas internacian formon, ĉar mankas la «i», trovebla en ĉiu nomo krom la franca kaj portugala.

En **Plena Ilustrita Vortaro** Galicio restas, sed Galico senpure malaperis. Anstataŭ tiu loknomo, estas Galegujo aŭ Galegio, pluformita de la gentnomo galego. Tiu ĉi estas artikolvorto funkcia same kiel «hispano», «kataluno» kaj «vasko»; de tiuj gentnomoj formiĝas la nomoj de lando kaj regionoj. Aligentano loĝanta en Galegio estas galegiano. Per tiu ĉi solvo du diversformaj radikoj estas eble eviti konfuzon.

Reirante al la du frazoj cititaj ĉe la komenco de tiu ĉi artikolo, ni povas ĝustigi la adjektivojn jene: «galega-portugala lingvo» en la unua frazo kaj «galegiaj grotoj» en la dua. Kaj tiel estas uzata tiu ĉi radiko en frazo ĉerpita el **Etnismo/1979**, n-ro 21, p. 26/.

«La intenco de la aŭtoro estas plej klara: kontribui al la firmigo de unueca formo de la astura lingvo, samrajta frato latinida de la kastilia, kataluna, portugala-galega kaj aragona...».

La simileco de la nomoj de ambaŭ regionoj en kelkaj etnolingvoj estas nur hazarda koincido, ĉar ne estas iu etimologia rilato inter la slava Galicio kaj la hispana **Galicia** kaj portugala **Galiza**. Tiuj ĉi devenas de la latina nomo **Gallaecia**, «lando de la **gallaeci**», kelta popolo parenca al la gaŭloj kaj galatoj. Loĝantojn de Galicio oni devas nomi galicianoj, ĉar ne ekzistas galica gento. Tiu regiono estis mikspoto de diversaj popoloj, inter kiuj troviĝis rutenoj, poloj, ĉeĥoj, moravianoj, slovenoj, germanoj kaj judoj.

---

## 75<sup>a</sup> Datreveno de la «Asturia Esperanto Asocio»

La 1904-an jaron oni fondis en Gijon-o la «Asturia Esperanto Asocio». Ĝi havis sia sidejo ĉe la Katolika Centro en la strato «La Morusujoj», hodiaŭ Sankta Bernardo, Konsistis la Asocion tri dekoj de gesamideanoj sub la Prezidado de S-ro Francisko Menéndez Rua, entuziasma kaj klera esperantisto kiu honoris min per sia ĝentila amikeco dum la deko de la jaroj 50.

La Asturia Esperanto Asocio bedaŭrinde malaperis. Tamen, la Esperanto Movado ĉiam renkontis en Asturio kaj precipe en Gijon-o entuziasmaj defendantoj pretaj por disvastigi la Internacian Lingvon de D-ro Zamenhof. Klara atesto estas la perfekta organizado de la 39<sup>a</sup> Hispana Kongreso de Esperanto okazinta en la bela urbo de Jovellanos.

Instruisto

# TRADUK-BANKO

Se vi, kiu komencis legi ĉi artikolon, iam ajn tradukis (as-os) ion ajn el la euzkera, galega, kastilia aŭ kataluna lingvoj en Esperanton; bonvolu daŭrigi la legadon gis la fino, ĉar ĉi linioj celas vin. Ja ne gravas ĉu viaj tradukoj estas etaj aŭ longaj, simplaj aŭ gravaj, malbonaj aŭ artismaj, kompletaj aŭ nefinitaj, ĉio valoras ore en nia projekto.

La traduk-banko estas ankoraŭ nura ideo apenaŭ skizita de pluraj personoj. Ĝi konsistas el deziroj sed... se la reagoj al ĉi alvoko ekvenas, la projekto baldaŭ povus iĝi vera realaĵo, palpebla malfikcio.

Laŭ la aktuala ideo, Tradukbanko konsistus esence el deponejo. Ĉiu tradukanto, pasinta, nuna kaj futura, aliĝinta al la ideo, sendus siajn tradukojn al tiu deponejo; tie, la tradukoj estus arkivitaj kaj listigitaj, tiel, oni ĉiam povus informiĝi pri kio estas jam tradukita, kaj kio ne; krome, la tradukoj ne perdiĝus por ĉiam en la tirkestoj de la forgeso. Ĉiu prilaborita teksto estus uzata (Kompreneble nur kun permeso de la tradukisto) por eventualaj publikigoj.

La deponejo estus patronita de ia supera hispana E-o organizaĵo, kun eksterduba kredindeco, kaj kies celoj kongruus certgrade kun tiuj de Tradukbanko. Oni enŝovis la ideon, ke

en mia lando la organizaĵo plej taŭga por preni tiun rolon plejgarantie, estus sendube «Fundación Esperanto».

La dua parto de la projektita tradukbanko, temus pri la kreo de konstanta komitato, kies laboro estus la solvado de tradukproblemoj al ili proponataj de iu ajn hispana tradukanto. Ĉi tiu aŭ alia komitato povus ankaŭ okupiĝi pri la planado de tradukoj konvene entreprenotaj de kelkaj personoj (ekzemple por aranĝo de antologio).

Unu el la taskoj unue plenumindaj de Tradukbanko estus la kolekto de ĉiuj tradukoj aperintaj en diversaj revuoj ekde la eniro de Esperanto en nia lando. Temas pri granda kvanto de bonaj tradukoj neniam aperintaj sub la formo de libro, kiuj alie estus perditaj por la novaj generacioj de e-istoj.

Nu, jen granda laboro entrepreninda staras antaŭ ni. Ĉiu intereso pri la afero, bonvolu tuj skribi al ni ĉe: Tradukbanko, Floranes 57 - 2 C, Santander.

Fine, aldonendas, ke al ĉi alvoko rajtas reagi ĉiuj personoj dezirantaj doni opiniojn, konsilojn kaj ĉiaspecajn ideojn pri la temo.

**Miguel Gutiérrez Aduriz**

## **IV-a H.E.J.S. TENDARO**

Okazonta en Gandia (Valencia)

3-7 aprilo 1980

Petu informojn al S-ro Carlos Moya Seguí

Angel del Alcázar 11-13-a

VALENCIA-18

# Notas de interés para todos los federados

La Federación ha editado un folleto informativo de cuatro páginas sobre Esperanto, con el que trata de difundir entre los no esperantistas el origen, hechos representativos y utilidad de nuestro idioma universal. El precio del folleto es de 3 ptas. unidad. Haced vuestro pedido (mínimo 100) a la Secretaría de la Federación. Los que deseéis conocerlo, pedid uno gratis.

Desde la dimisión de la Junta Directiva de la Sección Juvenil de la Federación en el pasado Congreso, la sede provisional de esta sección se encuentra en Valladolid, sin embargo se está reorganizando el movimiento juvenil y ya acaban de aparecer los primeros números de su revista juvenil «Juneco» y han celebrado el primer encuentro juvenil interregional. La IV Acampada Juvenil se celebrará en Gandía del 3 al 7 de abril de 1980. Todos los jóvenes interesados en la acampada, así como los que quieran colaborar en la revista, dirigiros a Carlos Moya Seguí.— Angel del Alcázar 11-13-a.— VALENCIA-18.

Como consecuencia del resultado de la encuesta realizada por la Directiva de la Federación sobre el futuro uso de la Oficina Central de la Federación Española de Esperanto en Madrid, resultado que fue hecho público en el pasado Congreso celebrado en Gijón, se resolvió utilizar dicho local para información y cursos de Esperanto. Tras diversas consultas personales con miembros de Madrid y de la anterior Junta Directiva, se nombra como representante de la Directiva de la Federación a D. Enrique Pérez Estévez. Asimismo en dicha oficina central se contará con la colaboración personal de D. Gerardo Flores Martín y de D. José María González Aboín.

Tenemos a disposición de cuantos lo deseen hojas de inscripción para el 66 Congreso Universal de Esperanto que se celebrará en Brasil en 1981. Pedidos a la Secretaría de la Federación.

La Directiva de la Federación ha recibido algunas participaciones de Lotería de Navidad, por parte de algunos socios federados. A ellos, aunque por desgracia no ha habido suerte, nuestras más expresivas gracias.

También queremos expresar nuestro agradecimiento a cuantas personas han tenido la gentileza de felicitarnos las pasadas fiestas.

## DONATIVOS RECIBIDOS EN 1979

(continuación)

Gerardo Flores .....	96
Manuel Alcubilla .....	500
Angel García Brañanova .....	100
Antonio Gamboa Sánchez....	2.500
Ramón Bastardas Serra .....	200
Antonio Bohigas Ferrán .....	100
José Arroyo García .....	200
José Luis Bringas .....	100
Faustina Martínez .....	500
Manuel Díaz Camacho .....	500

## DONATIVOS PARA EL F.A.L.P.

José Arroyo García .....	500
--------------------------	-----

## SOCIOS PROTECTORES EN 1979

1. José Balbe Salas (1.001)
2. Ramón Bastardas Serra (1.029)
3. José Arroyo García (893)
4. Juan Martínez Mahón (1.433)
5. Domingo Domenech (1.594)
6. José Lerroux Torres (373)
7. Eduardo Larrouy López (44)
8. Eleuterio Moreno García (998)
9. Llibert Puig Gandía (499)
10. Félix Gómez Martín (598)
11. Manuel López Serna (43)

## DONATIVOS PARA AGADO E-3

Carmen Alvarez .....	1.000
Luis Hernández .....	1.000

# ESPERANTO-DOKUMENTOJ

Nova serio n-ro 11E (1978) kun la titolo «La lingvo kaj la rajto je komunikado», kaj n-ro 12 E (1979) pri «La uzado de la Internacia Lingvo Esperanto kiel parta solvo de la lingvoproblemoj en internaciaj neregistaraj organizoj: kelkaj rekomendoj».

Kiel indikas la antaŭparolo, Esperanto-Dokumentoj priskribas la laboron, organizadon, kulturon kaj historion de la Esperanto-Movado. Ili aperas unuavice en Esperanto, en la angla kaj franca lingvoj. La enhavo de la diversaj serioj ne estas identa. Ĉi tiu serio anstataŭas tiujn dokumentojn antaŭe eldonitajn de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED). Reprodukto, ekstrakto aŭ traduko estas permesata, kondiĉe ke la fonto estu indikita. La dokumentoj estas aboneblaj ĉe ĉiuj landaj kotizperantoj de UEA aŭ rekte ĉe la eldonejo; Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 B J Rotterdam, Nederlando.

La Dokumento n-ro 11 enhavas i.a. la prelegojn faritajn de altrangaj scienculoj, inter ili la Ĝenerala Direktoro de UNESKO, pri temo, kiu aparte interesas la registarojn en la tuta mondo kaj ankaŭ aliajn internaciajn organizojn kiel UNESKO.

La Dokumento n-ro 12 temas pri

«La uzado de la Internacia Lingvo Esperanto kiel parta solvo de la lingvoproblemoj en la neregistaraj organizoj». Kiel indikas la titolo, tiu broŝuro precipe celas tiujn organizojn, kies laboron plenumas privataj civitanoj kaj plejgrandparte simplaj amatoroj, kelkfoje nur sciantaj unu au maksimume du lingvojn. La broŝuro klarigas —mi plu transkribas— kial la neregistaraj organizoj devas tranĉi elspezojn per limigo de siaj servoj, aŭ uzo de neprofesiuloj, aŭ forigo de interpretado en iuj kunvenoj, aŭ eldono de certaj dokumentoj en nur unu lingvo.

Same okazas ĉe la interregistaraj organizoj. Dum multaj jaroj la Aeronaviga Komisiono de la Organizoj pri Internacia Civila Aviado eldonis siajn dokumentojn nur en angla lingvo, malgraŭ tio ke ĝi posedas kvar oficialajn lingvojn. Lastatempe, renkontiĝo de specialistoj pri la rajto je komunikado (ĝuste tiu temo!) organizita de UNESKO, okazigis siajn diskutojn... nur en la angla.

Resume, du kajeroj tre interesaj kaj utilaj, kiujn ne nur Esperanto-Kluboj nepre devus aboni, sed ankaŭ izolitaj esperantistoj, ĉar ja la Dokumentoj liveras al ĉiu disvastiganto de Esperanto ege valoran trezoron prilingvan.

V.H.LL.

# LA DROGOJ

Ni parolas pri la drogoj, sed kiam ni parolas pri tio ni ĉiam pensas kaj babiladas pri la «herboj» kaj ankaŭ ĥemiaj materioj (heroino, morfino k.t.p.) kaj ni, en Hispanujo, forgesas du drogojn tre danĝerajn, la alkoholon kaj la tabakon. Mi jam antaŭskribis kelkajn liniojn rilate la unuan substancon, kaj konsiderante ke la malprofitoj kaj malavantaĝoj pro la uzado de la dua estas konataj de ĉiuj (kvankam la fumemuloj, viroj kaj virinoj, intencas ignori la malsanojn de ĝi kaŭzatajn, mi nun mallerte aranĝos iujn ideojn pri la drogoj, laŭ la vulgara kono kaj scio.

Mi deziras rimarkigi ke multaj el la ĥemiaj kuraciloj kiujn multfoje ni glutas (hipnozaj, trankviligaj, aŭ vigligaj substancoj) preskribitan aŭ ne de kuracisto, estas drogoj; kaj pro tio ili enhavas la samajn danĝerojn de la aliaj, heroino, L.S.D., morfino, k.t.p. Tamen ni kutimas nuntempe kaj ĉiutage uzi pilolojn el tiuj ĉi substancoj, kaj ili akompanas nin dum niaj vojaĝoj, dum niaj dormadoj, ĉar ili jam estas preskaŭ parto de nia personeco. Ni vizitas tre ofte la kuraciston kaj ni plendas kaj lamentas antaŭ li: «Sinjoro, mi estas tre nervoza», «Ne estas eble al mi dormi», aŭ «mi estas tre laca», aŭ, «mi pro cirkonstancoj de la familia vivo, de mia cirkaŭa medio, mi dezirus neniĝi, mi ploras, mi bezonas izoli min», «ho, donu al mi kuracilon kiu apartigu, forigu de mi tiujn ĉi animstatojn».

La persono kiu tiamaniere parolas, forgesas ke en nia cerbo, en nia volo, ni posedas la plej gravan, fontan utilan ilon kontraŭ tiuj ne normalaj sentoj; ke ĉiuj iloj, se ne estas uzataj (kaj preskaŭ neniam okazas tiel), korektege, kaj mi parolas pri tiuj medikamentoj, fariĝas drogoj. Kaj vi scias ke la drogoj rezultigas multajn malavantaĝojn: dependecon, kutimiĝon, abstin-sindromon, k.t.p.; krome ni devas menciigi la malsanojn kiujn pro la trouzado de tiuj medikamentoj la vir(in)o eble suferos.

Mi konsideras tre interese paroli kaj atentigi pri tiu temo, ĉar nuntempe la plej multaj personoj opinias ke ni troviĝas en la lando de la «mil mirindaĵoj» kaj forgesas la plej mirindan, nome, nian volon, nian konscion, kaj tamen nur ambicias aŭ sopiras trapasi sur la tero kiel simple biologia estaĵo, sed pensu ke kune kun la korpo, feliĉe, ni ankaŭ enhavas spiriton, (donu al ĝi la nomon kiun vi volas).

**D-ro A. Gil Contreras**

## AL MIA PATROLANDO (Por mia kara amiko Otaola)

Proksimiĝas la vespero  
Malaperis jam la sun'  
kaj la horoj de mistero  
Komenciĝas por mi nun

En arbar' najtingalo  
kantas ĝoje, sed ĝi min  
Malgajigas kiel palo  
De amata la virin'

Mi rigardas firmamenton  
De tre riĉa la kastel'  
Kie loĝas mia sento  
Ne ĉi tie estas cel'

Hispanlando ĉarma lando  
De vi vivas mi nun for,  
Por vi estas mia kanto  
Mia granda hejmdolor'

Mi en mondon tie venis  
Tie kara famili'  
Min patrino tie benis  
De ŝi lernis; estas Di'

Okulumis ŝi revante  
Min tre ofte en lulil'  
Kaj de ĝi min eklevante  
Kisis min dum fojoj mil

Ŝi lernigis min paroli  
Ŝia verko; mia kor'  
«Nur bonecon devas voli  
ĝin atingos per labor'

Nun la mondon mi trakuras  
Kaj mi ĉie en solec'  
Kio ĉirkaŭ mi murmuras  
Estas sent' el fremda spec'

Harmonian, karan vorton  
Aŭdu en lasta moment'  
En patrujo trovu morton  
Kie estas mia gent'

FELIKSO DIEZ MATEO  
(Verkita dum mia restado en Hungarujo)



## RIMOJ

Unu nokton, kiam la luno  
forestis de volvo ĉiela  
mi eniris en tombejon  
malgaja kaj senespera.  
Envolvita de tenebro  
kaj de silento mistera,  
mi demetis florbukedon  
kiel ampruvon eternan  
sur ŝtono kiu gardas  
la dormon d'amo himera...  
La vento ŝire ploranta  
inter la krucoj el fero  
rifuze, disigis ĝin  
kaj forŝovis en kotejon...  
La signifon mi komprenis  
de tiu muta elokvenco  
ĉar konkludis kiom pufa  
estas la monda vanteco  
ke, ol floro kaj memoro  
ege pli valoras preĝo...

Emilio García (Santander)

## EN KONGRESO

Mi estas franco,  
kaj mi hispano,  
mi kataluno,  
kaj mi arabo;

mi estas polo,  
kaj mi germano,  
mi estas judo,  
mi ja cigano!

Do, vi estas multo, samideanaro...  
ĉar estas mi nur... mondĉivitano!

Petro Nuez

---

# MIA FILINO JAM FUMAS

---

Surprizo atendis min hejme. Ĵus reenhejmiginta post mia ĉiutaga laboro, mi trovis mian filinon kun cigaredo inter ŝiaj lipoj. Ŝi sidadis trankvile kaj elpelis fumon per sia buŝo, kvazaŭ ŝi estus lokomotivo. Kiel kutime, al mia saluto ŝi respondis duonvoĉe. Ne, ŝi ne nervozigis. Mi rigardis ŝin kaj nenion demandis. Mi pensis, ke pli frue aŭ malfrue, mi ricevus iun respondon aŭ klarigon pri ŝia nova emo. Mi tute eraris. La horoj forpasis; ŝi de tempo al tempo prenis la cigaredskatolon kaj ekbruligis novan cigaredon. Pri mi ŝi tute ne atentis.

Kompreneble, mi jam vidis aliajn knabinojn, kiuj fumas. Mi ĉiam miris pri tiu nova modo kaj malbona gusto, sed jen, jam tiu emo kaj malvirto invadis mian hejmon.

Fine, mia pacienco atingis la tolereblan limon kaj mi demandis al ŝi. Kio estas hodiaŭ, kial vi fumas? Ŝi respondis, ke estas nenia grava festo, nur tio ke ŝi decidis fumi. La afero estas klara, ŝi deziras fumi. La respondo estas sincera kaj konkreta. Kion mi povas fari? Ĉu mi rajtas kontraŭstari ŝin? Ŝia respondo, kvankam kiel dirite sincera kaj konkreta, ne plene kontentigis min, ĉar mi, kiel patro ja rajtas (tion mi pensis) scii la kaŭzon de tiu subita emo.

Mi faris al ŝi multajn demandojn. Ŝi respondis, ke ŝi volas fumi ĉar ankaŭ ĉiuj ŝiaj amikinoj ankaŭ fumas, ke knaboj amikoj ŝiaj kritikis ŝin ĉar ŝi estas fraŭlino malmoderna, ke ŝajnas avino, ĉar ne scias vivi laŭ modernaj tempoj. Ŝi respondis min ankaŭ, nome de la libero, de la homaj rajtoj, de la emancipiĝo de la virino, de la nova demokrata vivo de nia lando, ke ŝi rajtas fumi kaj ke, la filoj ne estas posedaĵoj de la gepatroj. Al aliaj demandoj miaj, ŝi respondis, ke la vivo apartenas al ŝi mem, ke la tabako ne estas tiel malbona kiel diras la kuracistoj, ĉar eĉ ili mem fumas, ke ŝiaj idoj ne suferos pro tio ke ŝi nun fumas, ke ĝis nun fumi estis privilegio de la viroj kaj ke, virino rajtas same kiel viro, fine, ke ŝi neniel toleros ke iu entrudiĝos en sian vivon.

Vi jam povas kompreni, ke post tiom granda amaso da argumentoj, mi restis silenta. La vero estis, ke mi ne sciis kion respondi, kion diri. Precipe tuŝis min la vorto rajto (ŝi neniam

menciis devigojn). Mi kun patra amo intencis vidigi al mia filino la malavantaĝojn de la fumado, sed mia rikolto estis tute alia. Verdire, mi ricevus seriozan lecionon pri la vivo, pri la nunaj kutimoj, pri la evoluo (ĉu evoluo?) de la homa penso, precipe tiu virina kaj pri la fakto, ke laŭ ŝi mi ĉiam agis kiel diktatora patro.

Mi ĉiam konsideris min progresema homo. En mia koro vere mi sentis kaj sentas la nomatan liberiĝon de la virino, Miaj ideoj kaj agoj ĉiam iris tiucelen kaj malgraŭ tiu «leciono» de mia filino mi ne ŝanĝos mian pensmanieron rilate al la virino kaj ŝiaj rajtoj.

Mi deziras demandi al tiuj knabinoj, kiuj tiel senpripense akiras la kutimon fumadi, ĉu ili vere kredas, ke tiu estas la vojo sekvinda por la virina emancipiĝo? Kial vi, belaj fraŭlinoj, kopias de la viroj tiujn malvirtojn? Ĉu vi konsideras vin pli forta por alfronti la vivon, kun cigaredo inter viaj lipoj?

Kiam mi vidas virinon, kiu trankvile eltiras el sia mansako la cigaredskatolon kaj sin pretas fumi, neniel mi pensas, ke ŝi estas virino liberiĝinta, laŭ moderna kutima esprimo. Ŝi nur estas virino, kiu falis en la viran malvirton de la tabako. Ne, ĉarma virino, ne petu al mi alumetojn por ekbruligi vian cigaredon, mi ne kompleksos vin, mi vin ne helpos tiusence.

Malgraŭ tio, ke mia filino fumas, mi daŭre kunlaboros por la emancipiĝo de la virino, sed kara virino, se vi deziras vere samrajte vivi kaj respondeci antaŭ la socio, same kiel viro, ne kopiu de li la malvirtojn, inter kiuj troviĝas tiu de la tabako.

Mi esperas, ke tiuj fumantaj virinoj bone rekonscios pri la danĝeroj de la tabako, sed precipe mi deziras, ke ili komprenu, ke tiu ne estas la vojo por la virina emancipiĝo. La fumado estas malvirto, kiu detruas la sanon iom post iom, kaj en la kazo de la virino, ĝi ne nur atencas kontraŭ ŝia propra vivo, sed kontraŭ tiu de ŝia idaro, fakto en kiu oni ne povas senkulpi la fumantan viron.

Feliĉe mi sentas min trankvila sciante, ke mia patrino neniam fumis.

Luis Serrano Pérez

# ESTADO DE CUENTAS DE LIBRO-SERVO DE H.E.F. EN 1979

Existencias al 1 de enero 1979 .....		100.919 ptas.
Ventas realizadas en 1979 .....	141.426 ptas.	
Valor precio compra .....	104.650 ptas.	
Beneficio Bruto .....	36.776 ptas.	
Gastos generales (sellos, papel, etc.) ..	15.328 ptas.	
Beneficio Neto .....	21.448 ptas.	
Entregado a la Tesorería de H.E.F. ....	10.000 ptas.	
Beneficio Final .....	<u>11.448 ptas.</u>	<u>11.448 ptas.</u>
Existencias al 31 de diciembre de 1979 .....		<u>111.367 ptas.</u>
Existencia en material .....	83.191 ptas.	
En Caja de Ahorros Popular .....	27.444 ptas.	
En metálico .....	<u>732 ptas.</u>	
Total .....	111.367 ptas.	

Valladolid, 31 de diciembre de 1979  
JACINTO URUEÑA  
VICESECRETARIO DE H.E.F. Y  
ENCARGADO DE LIBRO-SERVO

## Aŭtoro serĉata por moderna hispana lernolibro

Por stimuli ĉe seriozaj interesuloj —kursanoj kaj memlernantoj— la ellernon de Esperanto en la hispanlingvaj landoj, «Heroldo de Esperanto» planas la eldonon de altnivela hispana lernolibro kun detalaj gramatikaj klarigoj, abundaj ekzercoj, literaturaj kaj fakaj legaĵoj, vortaretoj, praktikaj informoj kaj kontakt-adresaro.

La 200-paĝa verko devos esti ellaborita laŭ la plej modernaj teknikoj de lingvo-instruado, kun aparta atento al la struktura metodo, vort-ofteco kaj karakterizoj de la internacia lingvo kompare al la kastilia. Kasedo kompletigos la lernolibron.

«Heroldo» volonte konsideros sinproponojn de kvalifikitaj aŭtoroj. Ili devos ne nur tre bone koni Esperanton kaj la problemojn de ĝia instruado, sed ankaŭ esti profesiaj lingvo-instruistoj. Honorario por la laboro estas antaŭvidita.

Interesitoj bonvolu kontakti la redakcion de «Heroldo de Esperanto»,  
C/Juan Ramón Jiménez, 28, 6<sup>o</sup> A, Madrid-16. Hispanio.



# Raporto pri la agado de la Hispana Sekcio de I.L.E.I. dum la lernojaroj 1978-1979

Estas fenomeno ĝenerale agnoskita en la lernejoj ke dum la jarkvino ĵus pasinta, la esperanto movado en la hispanaj lernejoj refirmiĝas, materiigante la frapvortojn de la Hispana Sekcio de I.L.E.I. ESTAS NECESE krei konscion en grandaj amasoj da personoj pri la ekzisto de Esperanto; ESTAS NECESE diskonigi E-on en la lernejoj; ESTAS NECESE ke la instruisto estu la ĉefrolanto.

Dum la pasinta periodo la nombro da membroj estis 306, el ili 32 estas Provincaj Delegitoj kaj 42 estas Urbaj Delegitoj. Tiu nombro konstante pligrandiĝas pro la aktiveco kaj propagando de niaj kolegoj kaj amikoj.

Pere de nia Elementa Koresponda Kurso lernis Esperanton jam 366 personoj, el ili la plej granda parto profesoroj de Ĝ B E, kiuj kutime atingas la diplomon, aliĝas al H.E.F. aŭ se ili estas instruistoj aliĝas al I.L.E.I.; ofte enskribiĝas en la Perfektiga Kurso aŭ kuraĝas gvidi Elementan Kurson.

Ni devas substreki la laboron de Prof. Felix Navarro en la Labora Universitato

de Cheste (Valencio) kie 300 lernantoj de ĉiuj kardinalaj punktoj de la duoninsulo lernas Esperanton; la laboro de Prof. Antonio Alonso Nuñez en la Universitato de Santiago de Compostela; la Somera Kurso okazinta en la Lernejo pri Profesia Instruado en Málaga sub gvidado de Prof. Eleuterio Moreno García; la Somera Kurso okazinta en Alquerias (Murcia), kies gvidanto estas la juna studento Francisco Muñoz Carre kaj la du kursoj, gvidataj de Prof. Francisco Sanchez Antón, sukcese okazintaj en Alicante kaj Elche.

Fine, ni devas mencii elstarajn plensignifajn agojn kiel la sindona kunlaboro de la Eldonejo «ANAYA» kiu donacis 13 gravajn titolojn por Ekspozicio pri Lernejoj Lernolibroj okazinta en Massa (Italio) kaj organizita de I.L.E.I.

Por la venonta lernojaroj ni planas inter alie la nacian disvastigon de nia Elementa Koresponda Kurso pere de la lerneja profesia gazetaro.

F. ZARAGOZA RUIZ

## Estraro de la Sekcio

Sekciestro: Prof. Francisco Zaragoza Ruiz

Elementa Kurso Piloto: Direktorino Dolores Baeza Gil

Kaso kaj Studantaro: Stud. Javier Corbalán Berna

Infanaro: Lern. Juana Mari Bernabeu Calvo

Sekretario kaj Sekretariado por Marokio: Dir. Vicente Molins Reig

Biblioteko: Prof. José Expósito Sarrias

Sekretariado por Hispan-Ameriko: Prof. Ginés Salinas Rives

Sekretariado por Algerio: Prof-ino Olga Bernabeu Egea

Elementa Koresponda Kurso: Prof. Gvid-ino Josette Braem de Zaragoza

Perfektiga Koresponda Kurso: Prof. Gvid. José M-a Bernabeu Franco

Dokumentaro: Funkc. Dionisio Recio Pedras



Amikoj de UNESKO. Zamenhofa Festo

Unu plian fojon la diversaj E-Grupoj ekzistantaj en la Lando festis la datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof. Sekve, ni informas vin pri tiuj Grupoj kiuj sendis al ni raporton aŭ informon pri la okazintaĵo.

**BILBAO.**—La Bilbao-a Esperanto Grupo festis la naskiĝdatrevenon de D-ro Zamenhof per la jenaj aranĝoj:

**14-an Decembro.**—Unue, niaj reprezentantoj en diversaj Esperantistaj Kongresoj informis pri ili; sekve, F-ino María del Carmen Navarro prelegis pri «Famaj Polaj Muzikistoj, samlandanoj de Zamenhof». La interesa prelego estis ilustrata per pianludo de la plej famaj verkoj de tiuj polaj komponistoj, majstre ludataj de Prof. Leoncio García.

**15-an Decembro.**—Je la 8-a p.m. prelegis kastillingve Prof. Antonio Iranzo pri «Un idioma universal para una cultura universal».

**16-an Decembro.**—Tagmeze okazis interesa koncerto. En la unua parto oni ludis pianon kaj violonon, kaj en la dua parte oni ludis pianon. La ludantoj estis Prof. Leoncio García kaj Prof. Antonio Alonso.

Fine, okazis en centra restoracio frata bankedo en kiu partoprenis multaj esperantistoj kaj simpatiantoj.

**ZARAGOZA.**—La veterana Esperanto-Grupo «Frateço» honoris nian majstron Zamenhof per interesa libro-ekspozicio okazinta en sia sidejo kaj komuna vespermanĝo okazinta la 15-an de Decembro en centra restoracio.

## NIAJ GRUPOJ

**LEON.**—La membroj kaj simpatiantoj de la E-Grupo «La Verda Leono» festis la eventon per S-ta Meso en esperanto okazinta la 16-an de Decembro en la Preĝejo de la monaĥinoj Clarisas, kiun celebris Pastro Patricio de Fuentes, kiu la sekvan tagon prelegis hispane en la Salono de la Seminario, pri «Lastaj Novaĵoj pri Esperanto». Interesa artikolo pri la 120-a naskiĝdatreveno de D-ro Zamenhof aperis en la loka ĵurnalo «La Hora Leonesa».

**ALQUERIAS (Murcia).**—La juna kaj entuziasma Grupo de ĉi tiu urbeo omaĝis la kreinton de Esperanto per la jena programo:

**5-an de Decembro:** Kolokvo pri la problemo de la Edukado

**6-an de Decembro:** Projekcio de filmo pri la antaŭa kolokvo

**8-an de Decembro:** Kun la partopreno de 200 geesperantistoj de Alicante, Elche, Callosa, Murcia kaj, kompreneble, de Alquerías okazis renkontiĝo kaj oni intersanĝis opiniojn kaj spertojn por disvastigi Esperanton.

**9-an de Decembro.**—La esperantistaro estis afable akceptita en la Nacia Kolegio de Alquerías kaj ĝuis folkloran prezentadon. Fine ĉiuj entre amika etoso partoprenis senpagan bankedon.

**VALLADOLID.**—La Grupo «Fido kaj Espero» festis la naskiĝdatrevenon de D-ro Zamenhof per diversaj aranĝoj, ĉiuj kun granda ĉeesto de samideanoj kaj simpatiantoj.

La 13-an, ĵaŭde, je la 8-a vespere, prelegis esperantlingve nia Sekretario S-ano Luis Hernández pri tre interesa temo: «Historiaj eventoj dum la vivo de Zamenhof»; lia pa-

rolado rememorigis al ni la historiaĵojn kiujn la mondo traspertis en vivado de D-ro Zamenhof. Post tiu parolado la Grupo regalis la ĉeestantojn per «hispana vino».

La 14-an de decembro, S-ano Vicente de la Parte, Profesoro de la Elementa Kurso prelegis hispane pri «Otros intentos de idioma universal» temo tre interesa, speciale por la ĵus finintaj gelernantoj, kiuj tiamaniere eksciis aliajn provojn pri la internacia lingvo. Tiun tagon, Libroservo de H.E.F. aranĝis ekspozicion de esperantaj libroj kiuj estis rigardataj kaj foliumataj kun granda intereso.

La 16-an, dimanĉe, en Preĝejo Sankta Ana celebris Meson en esperanto Pastro Jonás Castro, kaj fine, je la 2-an kaj duono multaj samideanoj kuniĝis en centra restoracio kaj frate kunmanĝis.

Du interesaj artikoloj aperis dum tiuj tagoj en la du lokaj ĵurnaloj, unu pri «El Esperanto y su creador, el Dr. Zamenhof» verkita de S-ano Jacinto Urueña aperis la 14-an de decembro en «Diario Regional» kaj la 19-an de la sama monato kaj en la ĵurnalo «El Norte de Castilla» aperis artikoleto de M.R. Urueña titolita «El Dr. Zamenhof, oftalmólogo e iniciador de la Lengua Internacional».

### Ĉeestintino

MADRID.—La esperantistaro de Madrid festis la 120-an naskiĝdatrevenon de D-ro Zamenhof per esperantlingva prelego de Gian Carlo Fighiera pri «Vivo de Zamenhof», okazinta la 15-an de decembro en la sidejo de la Klubo de Amikoj de Unesko. Poste, grupo de madridaj geesperantistoj kunvenis en grava restoracio, kie ili en amikeca etoso noktomanĝis.

### SABADELL.—ZAMENHOF-TAGO 1979

Eble en la tuta historio de la esperantista movado ne koncentriĝis tiel grande homamaso kiel en

Sabadell la dimanĉon 16-an de decembro. Okazis la «Festivalo de la Infano» kaj omaĝo de la Zamenhof-Tago en la kadro de la «Internacia Jaro de la de Infano».

Ĝin organizis Centro de Esperanto Sabadell kunlaborado de la Najbaraj Asocioj «Creu Alta» kaj la Komisiono por la Parko Katalunio.

La plej grava okazaĵo estis la inaŭguro de la nomiga tabuleto de la Rondavenuo Zamenhof.

Tra la longa avenuo, fermita al la trafiko, oni disponis vastan ekspozicion de infandeseĝnaĵoj kaj vendotabloj de esperantlibroj kaj distraĵoj. Krome, oni regalis la ĉeestantajn plenkreskulojn per manĝetoj kaj la infanojn per fluida ĉokolado. Sur etendita longa papertapiŝo, la geinfanoj provizitaj per farbo kaj penikoj pentris laŭ siaj inspiroj. Samtempe du geparoj de gigantoj ĉirkaŭitaj de grandkapuloj dancis antaŭ la mirigitaj infanoj.

Sur podio staris la urbestro de Sabadell, Antonio Farrés Sabater, kuna kun la urbkonsilantoj pri kulturo kaj amuzaĵoj kaj la prezidanto de C.E.S. Llibert Puig.

La urbestro prononcis paroladeton kaj diris: En la nomo de la urbestraro kaj de la majoritato de Sabadell, oni povas redoni denove la esperantan nomon en iu strato de nia urbo, car laŭ la populara deziro esprimata sur la muroj «Ni volas la rondstraton Zamenhof», la urbestrero komplezis tian peton.

Llibert Puig respondis al la urbestro kaj diris: Dankon al la demokrata urbestraro, pro tiu esperanta atingiĝo; sed krom de tio en la nuna jaro 1979-a dediĉita al la Rajtoj de la Infanoj, ni petas en dokumento, la instruadon al la infanoj de la lingvo Esperanto.

Oni povas diri pro kio ni petas unue la instruadon de Esperanto al tiun de la kataluna lingvo. Ni estas tre katalanistoj, sed ni ne estas la adekvata societo por peti la katalunan. Tamen ni devas rimarki, ke dek-kvin junuloj, esperantistoj el Sa-

badell, aranĝis la katalunan semajnon en Zagrebo kaj aktive partoprenis en ĝi. Tio estas ankaŭ katalanismo.

Esperanto povas esti instrumento por kolekti poŝtmarkojn sed precipe ĝi estas laborilo por la homaj rajtoj kaj por tiuj de la infanoj; laborilo por kunlabori kun la nikaragua popolo; por la lukto por la ekvilibro inter la riĉa mondo kaj la malriĉa; por pli justa mondo; por la deka punkto de la Deklaracio pri la Infanrajtoj; kaj por la solidareco kaj justeco inter la popoloj.

Llibert Puig legis dokumenton, kiu estas destinita por sendi al la Ĝeneralitat kaj subskribita de dek-unu asocioj, kun la peto, ke oni instruu Esperanton en la baza instruado. Ĝi tekstas jene: «La subskribintoj nome de kolektivoj el diferencaj tendencoj kaj reprezentantoj de diversaj sociaj kondiĉoj, konsciaj pri la obstakloj por la komunikado kaj la komprenado inter la popoloj pro la lingva problemo, urĝas la aŭtoritatulojn pri eduko, la inkludon de la instruado de la internacia lingvo Esperanto en la E.Ĝ.B., ĉar nur kiam la dialogo povas okazi en egaleca plano oni forigos la diskriminacion pro parolaferoj kaj

estos atingita paŝo antaŭen por la realigo de la Homaj Rajtoj».

Post la inaŭgura ceremonio la artisto Xesko Boig kantis, akompanante sin mem per gitaro, popularajn kanzonojn en kataluna kaj esperanta lingvoj.

Kunmanĝado en restoracio finis la esperantistan feston dediĉitan tiel al la Zamenhof-tago kiel al la infanoj en tiu ĉi jaro 1979, la Internacia Jaro de la Infano.

G. Moya

## BARCELONO.—ZAMENHOFA-FESTO

Dum la sabato 15-a de decembro okazis en la sidejo de la asocio «Klubo de Amikoj de UNESKO» organizita de ĉiuj barcelonaj E-asocioj, brilan festeton.

En ĝi estis organizita: E-libro Ekspozicio. Festparolado fare de eminenta kuba esperantisto, s-ro Oscar Otero. Projekciado de koloraj diapozitivoj pri Japanujo kaj Internaciaj kongresoj. Lunĉo kaj trinkaĵoj.

La aranĝo estis vera agrabla kaj tre sukcesa kaj ĉeestis pli malpli 100 geesperantistoj.

---

# INTERNACIAJ KONGRESOJ KAJ KUNVENOJ

## 65-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Stockholmo, 2-9 Aŭgusto 1980.

La ĉefaj oficialaj programeroj okazos en la Sindikata Domo «Folkets Hus» situata en la centro de la urbo.

Temo de la Kongreso estos la diskriminacio laŭ diversaj formoj: Rasa, seksa, kaj kompreneble, lingva.

Dum la Kongreso okazos, i.a. Internacia Somera Universitato, Internacia Arta Vespere, Sveda Vespere, Belartaj Konkursoj, k.t.p. La interesantoj petu la unuan bultenon pri la Kongreso al la Sekretario de H.E.F.

Kongresa Glumarko (folio da dek) kostas 32 p-tojn. Mendu ilin al Libroservo de H.E.F.



## 36-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

Rauma (Finnlando) 25 julio-1 aŭgusto 1980.  
En la urbeto Rauma, situata en la sudokcidenta parto de Finnlando okazus ĉi tiu Kongreso kies ĉeftemo estos «Popola kultura tradicio en la nuntempa mondo».

Rauma estas konata kiel malnova marista kaj puntofaristina urbo, kie la etoso de la pasinteco ankoraŭ ŝvebas inter la lignaj domoj de la urbocentro.

Unua Bulteno kaj aliĝilo petu senpage de H.E.F.



## KULTURAJ ARANĜOJ EN LA ESPERANTISTA KULTURDOMO DE GRESILLON

1-a de julio / 1-a de septembro 1980  
dividiĝos en tri ĉefaj periodoj

Unua periodo: Prelegoj  
de mardo la 1-a de julio ĝis lundo, la 21-a de julio

- Diverstemaj prelegoj
- Diskutoj
- Praktikado kaj studado de la lingvo
- Ekskursoj

Dua periodo: Kursoj  
de merkredo la 23-a de julio ĝis lundo la 11-a de aŭgusto

- Rektmetoda kurso por komencantoj  
Grupa praktikado
- Studado de la lingvo (tradukado, studado de verkoj...)
- Manlaboroj
- Ekskursoj

Tria periodo: Artlaboro  
de merkredo la 13-a de aŭgusto ĝis lundo la 1-a de septembro

- Fotoarto (fotado, rivelado, prezento de fotoj...)
- Folkloraj dancoj
- Studado kaj praktiko de la lingvo
- Ekskursoj

Petu informojn ĉe Esperantista Kulturdomo,  
Kastelo Grésillon, F-49150 BAUGE (Francujo)



## POSTKONGRESO EN OSLO

Oslo 10-12 aŭgusto 1980.

La ampleksa programo de la tritaga restado en Oslo rakontas pri allogaj ekskursoj al la vidindaĵoj de Oslo kaj ĝia ĉirkaŭaĵoj, ŝipekskurso tra la bela Oslo fjordo. Ankaŭ okazos Distra Vespero kaj Renkontiĝo kun norvegaj esperantistoj ĉe festena tablo.

Aliĝiloj riceveblaj de Postkongreso en Oslo,  
Boks 942, OSLO 1, Norvegujo.

## INTERNACIA ESPERANTO-FERIO-SEMAJNO EN KROMMENIE (NEDERLANDO)

Kiel jam dum pli ol 20 antaŭaj jaroj ankaŭ en 1980 la Esperanto-societo UNUECO okazigos INTERNACIAN ESPERANTO-FERIO-SEMAJNON, ĉifoje en la kadro de la 700-jarfesto de Krommeniedijk. La datoj estas jenaj: 10-a ĝis la 17-a de aŭgusto 1980; limdato por la aliĝo: 1-a de majo 1980. Prezo 220.= nederlandaj guldenoj. Informojn kaj aliĝilon eksterlandaj geesperantistoj petu ĉe la sekretario: J. TH. Fischer, Gagarinstraat 104, 1562 TD KROMMENIE (Nederlando).

## 14-a INTERNACIA KONFERENCO DE I.L.E.I.

Malto 24-7 ĝis 1-8-1980.

Por aliĝiloj kaj pli detataj informoj, skribu al la Sekciestro en Hispanio Prof. Francisco Zaragoza, Colegio Nacional. Cursos de Esperanto. CALLOSA DE SEGURA (Alicante).

# 40-a Hispana Esperanto Kongreso

## LOKA KONGRESA KOMITATO

Prezidanto .....	Juan Carlos Ruiz
Vicprezidanto .....	Juan Astrain
Sekretariino .....	Pilar Solé
Kasisto .....	Augusto Casquero
Voĉdonanto (loĝado) .....	Juan Antonio Miazza
Voĉdonanto (urbaj aferoj) .....	Isabel Redondo
Voĉdonanto (arto) .....	Maribel Alonso
Voĉdonanto (Propagando) .....	Clara Esteban
Voĉdonanto (Korespondado) .....	Marina Gansó
Voĉdonanto (Ekskursoj) .....	Mamen Dávila
Voĉdonanto (Internaciaj af.) .....	Gian Carlo Fighiera

**ALIĜILOJ.**—Kun ĉi tiu numero de BOLETIN vi ricevas la koncernan aliĝilon por la 40-a Hispana Esperanto Kongreso. Ni konsilas vin plenigu ĝin tuj kaj sendu ĝin al la adreso de la Loka Kongresa Komitato.

**EKSKURSO.**—Por la 25-an de Julio oni planas ekskurson al iu najbara loko, sugestoj pri la vizitota loka plezure ricevas la organizantoj.

**EKZAMENOJ.**—Kiel ĉiujare dum la Kongreso okazos la ekzamenoj por atingi la titolojn de Kapabla Esperantisto kaj Instruisto de Esperanto. Tiuj personoj kiuj deziras partopreni bonvolu informu la Sekretarion de H.E.F.

## NEKROLOGOJ

---

La 22-an de novembro 1979-a mortis 66-jara, S-ano José Borda Serra, Prezidinto kaj kunfondinto de «Centro de Esperanto Sabadell». Al lia vidvino, gefiloj kaj genepoj nian sinceraj kondolencon.

### FORPISIS LA DOJENO DE LA BILBAO'A ESPERANTISTARO

**JOSE SANTAMARIA NEIRA** (1887-1979) mortis en Bilbao (Vaska lando) la 7an. Decembro 1979. Li esperantiĝis dum la jaro 1905 kaj estis unu el la fondintoj de la Grupo Esperantista kiu ekde 1906 funkcias en Bilbao.

Kiel Banka profesiulo li estis klera homo kaj samtempe fervora esperantisto, partoprenante diversajn Universalajn Kongresojn. Multfoje li estis elektita kiel estrarano de la Grupo kaj li zorgis pri la biblioteko, tial ke sia ĉefa emo estis la legado.

Kvankan lastatempe li devis resti hejmen, li daŭrigis sian kontakton kun la esperanta movado, pere de vizitoj de samideanoj, legado de libroj kaj revuoj, k.t.p.

**KE LI PACE RIPOZU!**

**JOSE ANGLADA PRIOR.** Mi legis en ĵurnalo «La Vanguardia» el Barcelono tagon 29an de Novembro 1979. malagrablan sciigon. En la vecina poblacion de Masnou, donde pasaba el verano ha fallecido a la edad de 86 años Don José Anglada Prior, georgista barcelonés, vicepresidente del «Stenografa Instituto Tutmonda». Autor entre obras publicaciones de un tratado de «Gramática, Ejercicios y Diccionario de Esperanto», fue laureado por la Real Academia de Ciencias Morales y Políticas por su estudio titulado «El sistema fiscal y la condición de las clases trabajadoras», en el que proponía la sustitución de los actuales impuestos por la recaudación de la renta territorial. Descanse en paz el ilustre finado». Jen la sciigo.

Mi konis s-anon Anglada dum la jaro 1928-a, okaze de la unua vizito kiun mi faris al la barcelona urbo. En tiu jaro, mi junulo kun grandaj iluzioj en la vivo, super ĉio kiel nova esperantisto, mi sentis neceson interrilatiĝi kun aliaj esperantistoj; Mia surprizo estis granda ĉar anstataŭ renkontiĝi kun novaj esperantistoj kiel mi, mi renkontis du veteranajn, mi dirus du kolosajn barcelonajn esperantistojn: s-roj Rocamora, advokato kaj Anglada, ekonomisto.

Mi ne povas forgesi la grandajn dezirojn de ambaŭ s-anoj, por ke mia restado en Barcelono estu agraba. Kaj dank'al ili mi konsideris ke pere de Esperanto estis eble interfratiĝi kun homaro.

Poste, malfacilaj tempoj disigis nin, kaj ĉirkaŭ 1949-a, proksimume, s-ano Anglada sciigis min pri la stariĝo de H.E.F. kaj konvinkigis min pri mia aliĝo al la nova Federacio. Mi akceptis sed miaj iluzioj ne estas la samaj.

Ripozu pace tiel karaj samideanoj kaj amikoj. Miaj rememoroj akompanos vin.

**José Lerroux. Barcelono**

# — SCIU, KE —

Pli ol 800 personoj en la tuta Lando, lernas Esperanton pere de la Koresponda Kurso de la Hispana Sekcio de I.L.E.I.

La grava kaj prestiĝa revuo «CLUB CCC» ekde sia numero de la monato Junio 1979 dediĉas tutpaĝan artikolon pri Esperanto. La sukceso oni atingis dank'al la intensa kaj senpaŭza agado de nia s-ano Antonio Gamboa.

En la bildkartoj de la prestiĝa firmao «Escudo de Oro» aperas la tekston «La pŝtkarto de la amikeco» en pluraj lingvoj, inter ili Esperanto. Tion atingis nia samideano Bohigas, de Barcelono.

En la prestiĝa revuo de la Europa Komunumo «Euroforum» aperas ofte informojn pri Esperanto.

La revuo «Fulvux» de la Junularo de la Ruĝa Kruco, en sia lasta numero publikas artikolon pri Esperanto.

En la numero 17 (1658) de «Heroldo de Esperanto» aperas sub la titolo «Nur 92-jaraĝa», artikolon verkita de la Prezidantino de H.E.F.

La esperanta disaŭdigo de Radio Pekino, okazas ekde la 30-a de Oktobro ĉiutage.

Radio Roma (R.A.I./Itala Radio) elsendas en esperanto ĉiun dimanĉon de 20,00 ĝis 20,20 laŭ Grenviĉa tempo (G.M.T.)

Firmao de la urbo Odena (Igualada) disvendas oleon «ESPERANTO».

Llibreria Esperanto de Barcelono disponigas al siaj klientoj pli da 200 E-verkoj de la plej gravaj E-eldonejoj kiel: Stafeto TK, UEA, SAT, Hungarujo, Anglujo, Aŭstralio, ktp.

## — DEZIRAS KORESPONDI —

Kun hispanaj samideanoj  
S-ino Rosica Dimitrova.—Str. C. Boris I, 21 vh Bap. 16—5250 SVISTOV (Bulgario).

S-ro Ilija N. Vladov.—Gurko 3 A.—5.000 VELIKO TARNOVO (Bulgario).

S-ino Rajna Sabĉeva Daĉeva.—Sergej Rumjanĉev 15.—5.000 VELIKO TARNOVO (Bulgario) pri ĉiu temo.

Inĝ. Vladimir Beljskij.—Ul Preĵeralskogo 16-18.—SU 652 600 BELOVO Kemerovskaja obl. U.S.S.R.

Hungara komencanto, 20 jaraĝa, pri Muziko, filmo, kaj kolektanto de afiŝoj, deziras korespondi kun gehispanoj. Johano Zajic.—BUDAPEST.—Irinji U 9-11/303.—H-1111.

Malnova esperantisto el Ĉeĥoslovakio, S-ro Ladislav Kempny.—739-49  
Metylovice ĉ.175 (Okr. Frydek-Mistek) Ĉeĥoslovakio. Li interesiĝas pri Literaturo kaj sporto.

Hungara laboristo, 35 jaraĝa, edziĝinta, kun gehispanoj por intersanĝo de gramofondiskoj. S-ro Fŕizs Jŕzsef.—3200 GYONGYOS.—Tokai ut 41 (Hungario).

Bulgara junulino, studentino pri angla Literaturo en Univer-  
sitato. Fino Karanfila Kalojanova.—Atanas Manchev 64.—  
8000 BURGAS (Bulgario).



# XL CONGRESO NACIONAL DE ESPERANTO

(Madrid, 19 al 24 de julio de 1980)

## PROGRAMA PROVISIONAL

### 19 (sábado)

Entrega de documentos a los señores congresistas.  
Inauguración de una Exposición esperantista.  
Visita al Museo de la Escuela Técnica de Minas.  
Conferencia.  
Vino español.

### 20 (Domingo)

Salutación por los representantes de los Grupos.  
Excursión a la villa de Chinchón.  
Misa en Esperanto.  
Conferencia en Esperanto.

### 21 (Lunes)

Solemne Inauguración del Congreso.  
Exámenes (Elemental y Superior) de Esperanto.  
Reunión de trabajo de la Directiva de H.E.F. con los delegados de Grupos y Secciones.  
Conferencia en Castellano.

### 22 (Martes)

Presentación de ponencias.  
Tarde artística.  
Banquete.

### 23 (Miércoles)

Discusión de informes.  
Teatro.  
Junta General Ordinaria de H.E.F.

### 24 (Jueves)

Reuniones de Secciones.  
Concurso Literario.  
Clausura del Congreso.

